

Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj

De Alfred Schubert

Nova komenco de ĵurnalista laboro en Esperantio okazis en Vilno. Pli ol 180 ĵurnalistoj el 37 landoj kunvenis por diskuti gravajn temojn de la Esperanta ĵurnalismo kaj revivigi la ĵurnalian asocion TEĴA.



De la 26a ĝis la 30a de majo 2008 en Vilno (Litovio) okazis la unua Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj. La kongresa temo estis *Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto*. Grava kongresa decido estis reaktivigo de TEĴA (Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio), kiu apenaŭ funkciis dum la lastaj jaroj.

Danke al la subteno de litovaj aŭtoritatoj la kongreskunsidoj okazis en la malnova urbodomo de Vilno kaj en la parlamentejo de Litovio. Loĝado, manĝado kaj ekskurso estis senpagaj por la kongresanoj. La prezidanto de la parlamento Ĉeslovas Jurŝenas bonvenigis la kongresanojn en la parlamentejo kaj regalis ilin per akcepto en parlamenta restoracio. Dum la akcepto



li transdonis oficialan gratulleteron al la nova prezidanto de TEĴA, la litova ĵurnalista Audrys Antanaitis.

La estraro antaŭ la julia membrokunveno en Roterdamo pretigis statutajn amendojn por jura registrado de la asocio, starigis retejon (www.tejha.org) kaj diskutliston kaj invitis ĉiujn esperantistajn ĵurnalistojn al membriĝo kaj kunlaboro en la renovigita TEĴA.

La kontaktadreso de la sekretario de TEĴA Vytautas Ŝilas estas litovastelo@takas.lt. Pli da informoj troviĝas je: www.esperanto.lt.

La urbestro de Vilno Juozas Imbrasas (maldekstre supre) kaj la prezidanto de la parlamento Ĉeslovas Jurŝenas (supre) salutis la partoprenantojn (maldekstre), kiuj kunvenis en la parlamenteja konferencejo, kie Litovio aliĝis al Eŭropa Unio (sube).



Kontakte knüpfen für die gemeinsame Arbeit

180 Journalisten aus 37 Ländern trafen sich in Vilnius

Der persönliche Kontakt ist wichtig, trotz aller Kontakte im Internet. Dies war einer der Sätze, die man beim Internationalen Journalistenkongress, zu dem vom 26. bis 30. Mai 2008 rund 180 Journalisten aus 37 Ländern in die litauische Hauptstadt Vilnius gekommen waren, immer wieder hören konnte. Natürlich nicht in Deutsch, sondern in Esperanto. Die Internationale Sprache Esperanto war nämlich einzige Konferenzsprache – wie bei Veranstaltungen von Esperanto-Sprechern üblich. Ohne Esperanto wäre die Verständigung sicher zum Problem geworden. Die Anwesenden sprachen nämlich über 40 verschiedene Muttersprachen und hatten – außer Esperanto – keine gemeinsame Sprache.

65 Programmpunkte wurden in vier Arbeitstagen abgehandelt, von *Zamenhof und die Presse* über ein *Abriss der Geschichte chinesischer Esperanto-Zeitschriften* und *Massenmedien in Litauen* bis zu *Information durch „Disvastigo“*. Trotz der Komplexität der behandelten Themen gab es keine Probleme mit der Verständigung. Damit konnte wieder einmal bewiesen werden, dass Esperanto auch als Fachsprache in der Praxis funktioniert.



Beim Thema Esperanto strahlen die Gesichter: (Bild oben, von links) Audrys Ananaitis (Präsident der *Litova Esperantista Ĵurnalista Asocio*), Česlovas Juršėnas (Parlamentspräsident der Republik Litauen) und Povilas Jegorovas (Präsident der *Litova Esperanto-Asocio*).

Gedankenaustausch im kleinen Kreis war ein wichtiger Bestandteil des Kongresses. Bild rechts: Peter Kühnel (links) im Gespräch mit dem Bürgermeister der litauischen Hauptstadt Vilnius Juozas Imbrasas.

Links unten: Roman Dobrzynski, der Autor von „*La Zamenhof-strato*“ war einer der 180 Teilnehmer und viel gefragter Gesprächspartner beim *Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj* in Vilnius.

Unten: Viel Platz war nicht in der Bar des Kongresshotels. Aber das störte die Journalisten nicht. Ob Fototermin, Interview oder Arbeit am Computer – bis spät in die Nacht wurde – nicht nur – gearbeitet.

Rechts unten: Mária Minichová und Petr Chrdle beim Empfang des Bürgermeisters von Vilnius.



Ĉu kunlaboro solvos la problemon?

Al multaj Esperanto-gazetoj mankas abonantoj

De Alfred Schubert

La gazetoj en Esperanto kaj pri Esperanto abundas. La problemo ne estas la kvanto de gazetoj, sed iliaj eldonkvantoj kaj nombroj de abonantoj.

Inter la 250 gazetoj en aŭ pri Esperanto nur dek unu atingas eldonkvanton de mil ekzempleroj. Inter ili malpli ol duono havas minimume 1000 abonantojn. Tio estas grava problemo. La kostoj de produktado grandparte estas fiksjaj kostoj, kiuj altigas la prezon de gazeto, kiu reduktas la eldonkvanton. La kreskantaj prezoj forpelas abonantojn kaj la prezoj kreskas ktp.

La solvo de la problemo estas facila. Se oni kreskigas la eldonkvanton, la prezo de la gazeto falas. Se la enhavo de la gazeto estas interesa, ĝi allogas novajn abonantojn kaj la prezo plue falas. Restas nur la demando: Kiamaniere eblas kreskigi la abonantaron de Esperanto-gazetoj? Unu el la eblecoj estas la kunigo de similaj gazetoj. Se gazeto A havas 1000 legantojn, gazeto B 700 kaj gazeto C 450, kunigita gazeto ABC devus havi eble 2000 legantojn, ĉar la

legantoj kiuj abonis pli ol unu el la gazetoj certe ne du- aŭ trifoje abonos la novan gazeton kaj kelkaj kontraŭuloj malabonos por protesti. Sed tamen la kunlaboro estas utila por ĉiuj tri. La redaktado estas pli facila kaj la produktadkostoj malkreskas. Krome pli gran-

da eldonkvanto faciligas la vendadon de varbado.

Gravas, ke oni ne metu la gazeton en la reton, ĉar se ĝi estas havebla en elektronika formo, ĝi kopieblas kaj transdoneblas. Gravas ankaŭ diskuti novajn konceptojn por esti sukcesa.



Claude Nourmont (maldekstre) kaj Alfred Schubert (dekstre) diskutis dum la ĵurnalista kongreso en Vilno pri kunlaboro. La foto je la fono estas grava dokumento de la historio de Litovio. Ĝi montras litovajn civitanojn, kiuj dum paca revolucio defendis la parlamentejon kontraŭ la trupoj de la disfalanca Sovetunio.

Internaciaj gazetoj

Titolo	Eldonkvanto	Abonkvanto	Landoj kun plej multaj abonantoj
Esperanto	5500	4089	Francio 396
Monato	1900	1700	Germanio, Francio, Belgio, Usono, Japanio
Heroldo de Esperanto	1100	1000	Svislando 200
Kontakto	1100	893	Francio 95, Hispanio 83, Brazilo 63, Usono 48
Sennaciulo	1000	850	Francio 320, Japanio 102, Brazilo 64
Literatura Foiro	850	750	Pli ol 100 al PEN-Centroj
Juna Amiko	1100	700	Italio 90, Hungario 70, Francio 60, Brazilo 50
Espero Katolika	1000	675	Ĉeĥio, Italio, Germanio
TEJO-Tutmonde	800	626	Francio 68, Germanio 54, Ruslando 38
Internacia Pedagogia Revuo	800	596	Germanio, Italio, Brazilo
La Ondo de Esperanto	700	545	Ruslando 93, Pollando 66, Germanio 44
La Gazeto	360	280	Francio 61, Germanio 27, Nederlando 25
La Kancerkliniko	300	?	Francio, Belgio, Usono
Femina	500	200	Svislando, Japanio
Naturista Vivo	90	90	Hungario, Francio, Pollando

Fonto: Kongresa Libro de la Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj, p. 54.

Disvastigo

profesie informas gazetaron

Profesia informado de la gazetaro necesas. Solvon por asocioj kiuj ne havas specialiston, kiu povas verki artikolojn, montris Giorgio Bronzetti. Li verkas artikolojn kaj aperigas ilin pere de la informagentejo *Disvastigo*.



Bronzetti ne nur verkas la artikolojn – ekzemple intervjuojn kun politikistoj kaj lingvistoj – sed ankaŭ liveras ilin al la ĝustaj adresoj.

Giorgio Bronzetti, Viale Aldo Moro 37, 66013 Chieti, Italia, tel. 0871561301, 3332928240, gbronzetti@disvastigo.it, gb@allarmelingua.it, www.disvastigo.it, www.allarmelingua.it

Esperanto aktuell

inter la plej interesaj gazetoj

En sia analizo de la Esperanta gazetaro en la *Kongresa Libro* (p. 52-53) Aleksander Korĵenkov skribas: „... Kio do estas la cetero inter la supozeble 250 aperantaj gazetoj? Ili estas lokaj kaj landaj bultenoj, ... kun neregula eldonritmo kaj varia paĝonombro. Malmultaj havas dignan aspekton. ... Inter ili la plej interesaj estas: *Le Monde de l'Esperanto* (Francio), *Esperanto aktuell* (Germanio), *Esperantolehti/Esperanta Finnlando* (Finnlando), *La Espero* (Svedio), *Kataluna Esperantisto* (Hispanio), *Skota Esperantisto* (Britio), *Tempo* (Kroatio), *Esperanto USA* (Usono), *Esperanto sub la Suda Kruco* (Aŭstralio), *Israela Esperantisto* (Israelo), kaj la jam menciitaj *Pola Esperantisto* kaj *Litova Stelo*. ...“

La fakto, ke fakulo – Korĵenkov eldonas *La Ondo de Esperanto* – mencias *Esperanto aktuell* je la dua loko inter la plej interesaj landaj gazetoj montras, ke Germana Esperanto-Asocio bone laboras. La redakcio tiurilate dankas al ĉiuj, kiuj kontribuas al la gazeto kaj per tio ebligas progreson. Estas la estraranoj de GEA kiuj ne nur prizorgas la administradon sed ankaŭ multe kontribuas al la enhavo, la provlegantino, la aŭtoroj kaj la fotistoj, kiuj plej grandparte respondecas pri tiu sukceso.

Alfred Schubert

TEĴA

elektis novan estraron

Dum la kongreso parto de la ĵurnalistoj elektis novan estraron de Tutmonda Ĵurnalista Asocio (TEĴA). En ĝi laboras Audrys Antanaitis, Mariana Evlogieva, Kalle Kniivilä, Aleksander Korĵenkov, Dieter Rooke kaj Vytautas Šilas.

TEĴA estis fondita la 19an de novembro 1946. Post iom da neaktiva tempo ĝi estis refondita en 1992 sub prezido de Stefan Maul. La asocio ĉesis ekzisti la 31an de decembro 2003 kaj estis reaktivigita dum la Vilna UK en 2005.



Post kvintaga laboro Povilas Jegorovas (dekstre) fermis la 1an Tutmondan Kongreson de Esperantistoj-Ĵurnalistoj. Maldekstre la prezidanto de la Litova Ĵurnalista Asocio Dainius Radzevičius.

Landaj gazetoj

Titolo (lando, se necese)

La Revuo Orienta (Japanio)	1800	1315
Esperanto aktuell (Germanio)	1400	1000
L'esperanto (Italio)	?	950
La Lanterno Azia (Koreio)	1000	835
Le monde de l'Espéranto (Francio)	1000	700
La Espero (Svedio)	?	550
Starto (Ĉeĥio)	660	500
Horizontaal (Flandrio)	600	400
Tempo (Kroatio)	550	352
Esperanta Finnlando	400	350
Bulgara Esperantisto	320	300
Pola Esperantisto	300	280
Litova Stelo	600	245
REGo (Ruslando)	250	210

La redakcioj (redaktoroj) de aliaj gazetoj ne respondis al la demandoj.

Fonto: Kongresa Libro de la Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj, p. 55.

Eldonkvanto

Abonkvanto

Eksterlandaj abonoj

8 ekster Japanio
100 ekster Germanio (ĉefe Aŭstrio)
6 ekster Koreio
50 en Kanado kaj kelkaj diverslande
kelkaj ekster Svedio
2-3 ekster Ĉeĥio
50 en Nederlando
50 ekster Finnlando (kun donacoj)
nur en Bulgario
40 ekster Pollando
100 ekster Litovio
15 ekster Ruslando

„Keine unregelmäßigen Verben? –

Dann bin ich dafür!“

Esperanto auf dem 97. Katholikentag in Osnabrück

Vom 22. bis 24. Mai war Esperanto durch einen Informationsstand auf dem 97. Katholikentag in Osnabrück vertreten. Ulrich Matthias hatte aus der Ferne dafür gesorgt, dass sich die Internationale Katholische Esperanto-Liga auf der Kirchenmeile im Abschnitt „Eine Welt“ beteiligen konnte, die Leitung am Ort übernahm Rudolf Fischer. Das Zelt mit einer kleinen Bücher- und Zeitschriftenausstellung war mitten auf der Straße neben der Johanskirche – im Gegensatz zu ähnlichen Gelegenheiten – für jedermann frei zugänglich, nicht nur für ausgewiesene Teilnehmer.



Junge Interessenten vor dem Zelt des Esperanto-Informationsstandes

Foto: Hedwig Fischer

Bei strahlendem Sonnenschein lockten große Transparente „Esperanto – bona ideo“ Interessenten an, denen eine ganze Reihe von Esperantofreunden Rede und Antwort standen: Markus Heupel, Otto Nitsche, Helmut und Nils Klünder, Christian Wesselmann, Roswitha Floer, Hedwig und Rudolf Fischer und vor allem Hans Welling, der als einziger in der Nähe wohnt. Er hatte auch für die Transparente gesorgt und sammelte fleißig Adressen für einen Kursus in

Osnabrück. Drei Studenten trugen sich für einen Kurs im Wintersemester an der Universität Münster ein.

Auffallend die allgemeine Zustimmung von Lehrern und Eltern, Esperanto in den Schulen anzubieten. Schüler waren mit dem Hinweis „keine unregelmäßigen Verben“ ohnehin gleich gewonnen. Die vom Deutschen Esperanto-Bund herausgegebenen neuen Flugblätter, darunter ein neues mit dem Titel „Esperanto in den Kirchen“, fanden viel Anklang. Ein ehemaliger Industriemanager wollte eine Ermunterung loswerden: „Lassen Sie nicht nach, Esperanto muss kommen!“

Verkäufe hielten sich wie gewohnt in Grenzen. Einzig die DVD „Esperanto elektronisch“ ging einigermaßen, davon eine auf Bitten des Bibliothekars als Spende an die Gefängnisbücherei in Münster. Vielen Interessenten konnte eine Kontaktadresse ihres Wohnorts mitgegeben werden. Betreuer des Nachbarstandes kauften Lehr- und Wörterbücher. Die meisten Interessenten äußerten, dass sie nach dem Trubel des Katholikentages auf Esperanto zurückkommen wollten. Die notwendigen Adressen stehen ja auf den Faltblättern.

Rudolf Fischer

Esperanto-Jugend

Julia Hell Bundesvorsitzende

Im Rahmen des 85. Deutschen Esperanto-Kongresses in Essen kam der Vorstand der Deutschen Esperanto-Jugend zu einer Vorstandssitzung zusammen. Bereits seit einiger Zeit ist es gute Sitte, dass sich die Vorstände von GEA und GEJ gegenseitig „besuchen“. So kommt auch der GEA-Vorstand regelmäßig auf der Internationalen Woche der GEJ zusammen.

Der Vorstand der Deutschen Esperanto-Jugend hatte viel auf dem Programm, war dies doch die erste Vorstandssitzung mit dem neuen Vorstand. Julia Hell aus Chemnitz gab auf dem GEK ihr Debüt als Bundesvorsitzende. Neben Paul Ebermann (Bundesgeschäftsstelle) und Leo Sakaguchi (Projekt Sub18) nahm auch die neue

Kassiererin Carolin Hötzl aus Hannover an der Vorstandssitzung teil. Rolf Fantom (Internationale Woche) konnte als Brite wegen des zeitgleich stattfindenden britischen Kongresses leider nicht teilnehmen. Die Planungen für die Internationale Woche 2008/2009 in Biedenkopf (nördlich von Frankfurt am Main) laufen jedoch bereits. Erfreulich auch, dass der Fördermittelbescheid des Bundesministeriums bereits vorliegt. Andreas Diemel berichtete in diesem Zusammenhang von der Tagung mit dem Bundesjugendministerium in Berlin im März. Schon jetzt wirft ein weiteres Projekt seine Schatten voraus. Im Sommer 2009 wird der Internationale Jugendweltekongress an der polnisch-tschechisch-deutschen Grenze stattfinden. Die Veranstaltung im tschechischen Liberec wird von den drei Verbänden gemeinsam organisiert. Auf der Vorstandssitzung nahmen die deutschen Organisatoren das interaktive Planungsportal in Betrieb, das einen schnellen Informationsaustausch garantiert und Planungshilfen bietet. Nicht nur hier zahlt sich aus, dass die Deutschen und die Polen in der Vergangenheit so eng zusammengearbeitet haben. Auch für das Projekt Sub18 gibt es Planungen für eine gemeinsame Veranstaltung. Sub18 bietet Wochenendtreffen für junge Jugendliche an, die dadurch an die Esperanto-Welt herangeführt werden sollen. Das 6. Sub18-Treffen soll in Bremsdorfermühle in Brandenburg stattfinden und richtet sich insbesondere auch an junge polnische Teilnehmer.

Paul Ebermann berichtete über den Baufortschritt im Esperanto-Haus in Berlin, in dem sich auch die Bundesgeschäftsstelle befindet. Dort hilft nun auch Felix Zesch regelmäßig, der bis 2005 Bundesvorsitzender und davor Redakteur der Mitgliederzeitschrift *kune* war. Über die aktuelle Entwicklung von *kune* berichtete deren Redakteurin Luisa Rund aus Berlin schriftlich. Sie hat die noch ausstehenden Ausgaben aus dem vergangenen Jahr nun beinahe aufgeholt. Diese werden bald ausgeliefert.

Schriftlich berichtete auch Stephan Pakebusch aus Frankfurt. Er hat zu Beginn des Jahres die Internet-Esperanto-Kurse der Esperanto-Jugend übernommen. Felix Zesch hatte im Vorlauf der Arbeitssitzung eine ausführliche Statistik über die Mitgliederentwicklung anhand der Mitglieder-Datenbank erarbeitet, die ebenfalls besprochen wurde. Als neue Vertreterin der Esperanto-Jugend wurde am Sonntag Julia Hell in den Vorstand des Deutschen Esperanto-Bundes gewählt. Traditionell ist der/die GEJ-Bundesvorsitzende auch im Vorstand von GEA.

Deutsche Esperanto-Jugend

Vortrag und Kurskurs

Die Esperanto-Gesellschaft Frankfurt lädt am 23. Oktober 2008 ab 19 Uhr (bis ca 22 Uhr) in dem Saalbau in Frankfurt-Bockenheim zum Informationsabend über Esperanto ein, das seit mehr als 100 Jahren in alle Länder der Erde verbreitet wird. Der Vortrag informiert über die Sprache, ihre Entstehung und Entwicklung und ihre leichte Erlernbarkeit sowie über die Esperantokultur – vom Vereinsleben in Frankfurt bis zur weltweiten Nutzung im Internet. Wer Interesse an Esperanto bekommen hat, kann am 28. Oktober 2008 im Saalbau in Frankfurt-Bockenheim von 19 Uhr bis ca. 21.30 Uhr einen Esperanto-Kurskurs besuchen.

Monika Finnegan-Reuss

Ekskurso al Rüdesheim

La Esperanto-Societo Frankfurt invitas al ekskurso al Rüdesheim. Forveturo per trajno: Sabaton 20an de septembro je la 9h53 Ffm kajo 23, aŭ kunveno al lifto supre de Drosselgasse 11h30 apud la kaso. Programo en Rüdesheim: piedirado tra Rüdesheim, manĝado en restoracio, veturado per telfero al „Niederwalddenkmal“, piedirado tra la vitejoj, telfere suben al Assmannshausen kaj ŝipe reen al Rüdesheim. Ĉiu estas bonvena speciale ankaŭ el apudaj kluboj kaj heslandaj esperantistoj kiuj ne estas membroj ĉe ni.

Ni petas anoncon al Monika Finnegan-Reuss 06665/918470 por faciligi la planadon.

Monika Finnegan-Reuss

Multkolora, belega Frankfurt La Parado de Kulturoj en Frankfurt

Kiel en antaŭaj jaroj, kelkaj regionaj esperantistoj el Frankfurt, Vizbadeno kaj Marburgo partoprenis sub la nomo „Esperanto Frankfurt“ en la „Parado de Kulturoj“ kiel unu el ĉirkaŭ 80 partoprengrupoj en ĉiulandaj kostumoj.



La parado okazis la 5an fojon kaj estas organizata de urbestro de Frankfurt. Ni pligrandigis la grupimpreson per unuecaj kostumoj kiujn desegnis kaj kudris la estrino de la grupo: diverskoloraj pelerinoj kun terĝlobo kiel ĉapelo sur niaj kapoj. La kostumoj kaj la renovigita flag-dekorita vagoneto bone kongruis kun la ĉi-jara slogano de la parado „multkolora estas belega“. Ĉe la vagoneto ni ankaŭ havis terĝlobpilkon, malfeliĉe iom etan, kaj la vagoneto portis niajn varbilojn. Tiel iris ok partoprenantoj tra la centro de la urbo, informis homojn ĉe la rando kaj disdonis niajn varbilojn – flugfoliojn pri Esperanto, la kulturo, la lingvolernebleco, GEJ ktp. Bedaŭrinde post tri kvaronoj de la vojo nia materialo elĉerpiĝis. En belega varma vetero la spektantoj estis ege interesataj preni niajn novajn informflugfoliojn, ofte ankaŭ infanoj interesiĝis. Ĉar lastjare la malbona vetero malmultajn homojn altiris kaj pluvego eĉ forigis grandparte la reston, ni ne kunportis sufiĉe da flugfolioj: ni disdonis preskaŭ 200 kaj esperas ke kelkaj montros la bonan vojon al la Esperanto-Societo Frankfurt. Ĉiu grupo estis prezentita de la loka radio *Planet Radio* apud Hauptwache kaj je la fino de la parado vojo ĉe la bordo de rivero Majno ĉiu grupo povis mallonge sin prezenti kaj oni klarigis por nia grupo

kio estas Esperanto. Ni eĉ havis la eblecon mem inviti la Frankfurtanojn al nia inform- kaj varbotago por Esperanto en oktobro (vidu supre). Ni jam invitas la regionajn esperantistojn por la sekventa parado en Junio 2009 – sufiĉajn kostumojn ni havas.

Herzberg am Harz salutas en Esperanto

Kvaroficialaj esperantlingvaj bonvenigŝildoj estis fiksitaj al la germanaj kaj estas bone videblaj de ĉiuj, kiuj venas per aŭto al Herzberg am Harz – la Esperanto-



to-urbo. La aldonaj bonvenigŝildoj el dura kverkoligno, kiujn la urbo financis, kostis po 750,00 EUR.

Ili troviĝas ĉe la urborando el la veturdirekto Herzberg-Pöhlde respektive Duderstadt, el direkto Göttingen (ĉe la forte frekventata federacia strato 27), el direkto Osterode am Harz respektive Seesen (federacia strato 243) kaj el la veturdirekto Herzberg-Siebert respektive St. Andreasberg, kie okazos la venonta Printempa Semajno Internacia.

Je daŭro tio estas bonega reklamo por Esperanto kaj por la bela urbeto meze en Germanio, tuj apud la nacia parko Harz-montaro. Por pluaj ŝildoj sponsoroj estas serĉataj.

Kromajn fotojn kaj aliajn informojn pri la Esperanto-urbo vi trovas sur la nova retpaĝo – baldaŭ kun blogo – sub: <http://esperanto-urbo.de>

Petro Zilvar, Zsófia Kóródy

Marika Frense, Otto Kern

Herzberg 2-jara Esperanto-urbo

Je la 12a de julio 2008 Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo festis sian duan „naskiĝtagon“. Al la festo aliĝis gastoj el 15 landoj.

red.

Gratulon al profesorino Sabine Fiedler

Germana Esperanto-Asocio gratulas fiere al sia membro d-ino Sabine Fiedler, kiu en junio ricevis la titolon de eksterorda profesoro (apl. Professor) por anglistiko de la universitato de Leipzig. S-ino Fiedler estas vicprezidanto de „Gesellschaft für Interlinguistik“ kaj modele laboras per Esperanto en la scienca medio.

Lastan vintron ŝi ekzemple organizis la unuan agnoskitan lekci-modulon „universalaj lingvoj“, i.a. kun Esperanto-kurso, en Leipzig (vidu *Esperanto aktuell* 2008/2, p. 9). La 28an de junio 2008 okazis en ŝia universitato „Longa nokto de la sciencoj“. Ŝi tuj kontribuis per „Esperanto: de projekto al lingvo. Morta lingvo vivas.“ en la instituto por anglistiko. Venis 25 aŭskultantoj, la plej bona sukceso de la instituto.

Rudolf Fischer

Esperanto aktuell volonte envicigas sin en la linion de la gratulantoj. red.

Esperanto-instruado daŭros

Ĝis nun okazis regule Esperanto-kursoj kaj seminarioj pri interlingvikaj temoj en la universitato de Münster. Gvidis ilin ĝis nun sukcese Rudolf Fischer. Sekve de la ĝeneralaj studreformoj tio estis en danĝero, ĉar la nova ĉefo de la Instituto por Ĝenerala Lingviko planis, organizi nur majstran studon, por kiu la ĝisnuna lekcikomisiito Fischer ne havis la necesan kvalifikon.

Bonŝance almenaŭ la lingvokursoj povas daŭri, kaj eĉ por studentoj de ĉiuj studofakoj. Nome kadre de la bakalaŭraj studoj en la filozofia fakultato ĉiu fako devis liveri iun ĝeneralan temon al la baza parto de la studoprogramo. La institutestro tiam ekhavis la ideon, ke lia instituto povas kontribui per Esperanto-kurso.

Tial nun jes bedaŭrinde la seminarioj forfalas, sed anstataŭe Esperanto aperas kiel elektelebla studunujo en ĉiuj bakalaŭraj studoj de la fakultato dum la venonta vintra semestro. Oni lernas du horojn semajne. Fine de la semestro la partoprenantoj devos sukcese trapasi

ekzamenon, por ricevi entute du studopontojn. Tiel estas nun unika ŝanco, montri al la studentoj, kiel facile oni povas sukcesi lernante Esperanton. La kurso estas limigita al 15 partoprenantoj. Estas la interesa demando, ĉu la nova oferto trovos grandan intereson aŭ ne. Se jes, tiam povos okazi daŭriganta kurso en la somera semestro.

Rudolf Fischer

Gazetara laboro

La gazetara komisiono de Germana Esperanto-Asocio organizis „centran artikolon“ okaze de la Universala Kongreso en Rotterdam. Per tio la komisiito Thomas Sandner revivigis agadon, kiu funkcias jam ekde pluraj jardekoj, sed lastatempe ne plu estis aplikata.

Ĉiu partoprenanto de granda Esperanto-aranĝo estas petata, sendi artikolon al la redakto de sia loka gazeto. Ĉar ne ĉiu havas tiurilatan talenton, oni ricevas „centran artikolon“, t.e. artikolo centre verkita. Ĉiu devas nur enmeti sian nomon kaj povas eventuale aldoni iun individuan informon, kiu laŭeble estu interesa por la hejma loĝloko.

Antaŭ la aranĝo oni ricevas demandon, ĉu oni pretas partopreni en tiu agado. Tiuj, kiuj pozitive reagis, post la aranĝo ricevas la centran artikolon kaj devas tiam tuj kompletigi kaj plusendi ĝin. Tiel ni povas atingi, ke raportoj pri Esperanto-aranĝoj aperas en laŭeble multaj lokaj gazetoj. *Rudolf Fischer*

Deutsche bestreiken EU-Vorlagen

Wie die Heidenheimer Zeitung vom 3. Juli 2008 berichtet, proben die Bundestagsabgeordneten den Aufstand gegen die Europäische Union. Grund ist, dass ihnen immer öfter Beschlussvorlagen von der EU-Kommission nicht wie in der „Verordnung 1/58“ festgelegt, auch in Deutsch, sondern nur in Englisch oder höchstens noch Französisch präsentiert werden. Solche Vorlagen werden jetzt unerledigt liegen gelassen. Darüber hinaus denkt man über finanzielle Sanktionen nach, sollte Brüssel nicht nachgeben.

Soweit die Heidenheimer Zeitung. Der Deutsche Esperanto-Bund sieht in dem

Druck, Deutsch zur dritten privilegierten Sprache unter den 23 Amtssprachen zu machen, keine gerechte Lösung für die internationale Kommunikation in der EU. Übersetzungen von Texten, die den Bürger betreffen, müssen in allen Muttersprachen vorgenommen werden. Bei der internen Kommunikation von EU-Instanzen könnte Esperanto auf Dauer in einigen Kommunikationssituationen eine gerechte und weniger aufwändige Lösung sein.

Rudolf Fischer

Quelle: http://www.hnp-online.de/index.php?mode=full&cat=171&open=&open_u=&minDate=&s_id=928bd9bf642656819d4c3d774d96b261&ident=&id=416823

Blindtexte als Esperanto-Werbung – Wer verwirklicht diese gute Idee?

Gute Ratschläge sind wohlfeil. Manchmal sind sie aber auch wirklich sehr überzeugend und sollten unbedingt beachtet werden. So schrieb Wolf Bruns, der Leiter Text-College OHG aus München, an den Bundesvorstand Folgendes: „... heute kam mir eine Idee in den Sinn, die vielleicht einen kleinen Beitrag für die Bekanntmachung und Verbreitung des Esperanto darstellen könnte. Und zwar: In der Werbung, in der ich tätig bin, verwenden wir in Layouts von Anzeigen, Broschüren und anderen Werbemitteln sogenannten Blindtext, der zeigen soll, wie das Schriftbild aussehen wird, bevor der eigentliche Text geschrieben ist. Blindtexte kommen aus verschiedenen Quellen, am weitesten verbreitet ist wohl ein verballhorntes Latein. [...]

Wie wäre es, wenn Sie den Werbeagenturen in aller Welt Esperantotexte als Blindtexte zur Verfügung stellen würden? Zum Beispiel könnte das ein Stück unverfälglicher Esperanto-Literatur sein, das frei verwendbar ist.

Auf die Weise gewöhnen sich die Werbegestalter und -texter an den Klang der Sprache, inhalieren ihn sozusagen unterschwellig. Und das Esperanto wird zum Gesprächsthema. „Weißt Du übrigens, dass das hier eigentlich gar kein

Blindtext ist, sondern Esperanto?“

Als Quellen für Blindtext dienen heutzutage vor allem diverse Internetseiten, z.B. <http://www.newmediadesigner.de/>. Diesen müsste die Esperanto-Gemeinschaft einfach ihre Texte zur freien Verwendung als Blindtext zur Verfügung stellen.“

Soweit der Text dieses ungewöhnlichen, aber einleuchtenden Vorschlags. Jetzt kommt wie immer die „Wermachtsfrage“: Wer macht's? Findet sich unter den Lesern von *Esperanto aktuell* jemand, der bereit ist, diese Idee aufzugreifen und im Auftrag des D.E.B. zu verwirklichen? Dann möge er sich beim Vorsitzenden melden.

Rudolf Fischer

D.E.B. bei der Neuen Fruchtbringenden Gesellschaft in Köthen

Sichtbar sein heißt auch, als Deutscher Esperanto-Bund an Veranstaltungen anderer Vereinigungen teilzunehmen, besonders wenn sich die Zielsetzungen überlappen. Das ist bei der Neuen Fruchtbringenden Gesellschaft zu Köthen/Anhalt der Fall. Sie wurde am 18. Januar 2007 gegründet und versteht sich in der Nachfolge des historisch ältesten Sprachpflegevereins in Deutschland, der Fruchtbringenden Gesellschaft von 1617. Vorsitzende ist Frau Prof. Dr. Uta Seewald-Steeg, Computerlinguistin und Romanistin, also alles andere als eine weltfremde Romantikerin.

An der 2. Jahrestagung vom 20. bis 21. Juni 2008 nahmen in Köthen gleich zwei Vorstandsmitglieder des Deutschen Esperanto-Bundes teil, einmal Dr. Jörg Gersonde und seine Frau, die in Köthen wohnen, und der Bundesvorsitzende Dr. Rudolf Fischer. Die Tagung fand im soeben völlig restaurierten und zur Tagungsstätte umgebauten Marstall des Köthener Schlosses statt, ein Rahmen, der auch dem Deutschen Esperanto-Kongress zur Ehre gereichen würde.

Unter den zahlreichen Vorträgen ragten für Esperantofreunde folgende beiden heraus: „Sprachenvielfalt: Erkennen von Werten statt wertfreien Erken-

nens“ von Prof. Dr. Hermann Dieter, Vorstandsmitglied des Arbeitskreises Deutsch als Wissenschaftssprache (ADAWIS), Berlin und „Die Stellung der deutschen Sprache in der Europäischen Union“ von Dr. Dietrich Voslamber, Vorstandsmitglied des Vereins Deutsche Sprache, Freiburg.

Der letzte Vortrag veranschaulichte die bisherige Sprachenregelung auf den verschiedenen EU-Ebenen. Es schlägt einem schon die Sprache, wenn man erfährt, dass in den Sitzungen der Europäischen Kommission nicht einmal gedolmetscht wird. Engländer und Franzosen sprechen ihre Muttersprache, alle anderen können sich Englisch oder Französisch als Fremdsprache aussuchen.

Bei einer anschließenden Podiumsveranstaltung konnten sich alle vertretenen Sprachvereine aus Deutschland, Österreich und der Schweiz vorstellen, darunter auch der Deutsche Esperanto-Bund. Dessen Vorsitzender erläuterte das verbindende Motto: „Wer Deutsch verteidigen will, darf nicht an den deutschen Sprachgrenzen haltmachen.“ Der muss nämlich auch für die internationale Kommunikation eine Lösung anzubieten haben, die die Muttersprachen nicht gefährdet. Einig waren sich die Anwesenden darin, dass der Ansatz „Nur Englisch“ alle Kulturen bedroht, auch die englische.

Der gesellige Teil ergab die Gelegenheit für beide Esperanto-Vertreter, mit einigen Delegierten näher bekannt zu werden. So wurde mit Thomas Paulwitz, dem Herausgeber der konservativen Sprachzeitschrift „Deutsche Sprachwelt“, ein Zeitungsaustausch verabredet. Da bereits die Idisten in dieser Zeitschrift regelmäßig werben, sollten das die Esperantofreunde ebenfalls tun. Dr. Voslamber, ehemaliger Beamter der Europäischen Kommission, propagiert Deutsch als dritte privilegierte Sprache in den EU-Instanzen. Er war erstaunt, dass der Deutsche Esperanto-Bund diese Lösung nicht als gerecht ansieht und auf die Gleichstellung aller Muttersprachen in Europa pocht.

Insgesamt müssen die Esperanto-

freunde die Sprachpfleger und -schützer als potenzielle Verbündete im Auge behalten. Die Neue Fruchtbringende Gesellschaft hat die Rolle einer neutralen Dachorganisation und ist deshalb unser vornehmlicher Ansprechpartner.

Rudolf Fischer

El la estraro

Kvankam la estraro post la Germana Esperanto-Kongreso en Essen ne ree kunvenis, la estraranoj daŭre estas en vigla kunlaboro helpe de la Interreto.

Nova retpaĝo kun la faldfolioj

En la reto nun troviĝas nova paĝo kun niaj faldfolioj, por rigardi kaj mendi per la adreso faltblaetter@esperanto.de. Venis jam laŭdo de instruistino pri la Angla, kiu serĉis bazan materialon pri Esperanto por sia klaso; ĝuste la koncizaj variaj informoj de la faldfolioj perfekte taŭgas, skribis ŝi.

Nova logotipo de Dirk Bindmann

Laŭ peto de la estraro Dirk Bindmann kreis novan GEA-logotipon, kiu estos uzata por la retpaĝo de GEA. Ĝi estas analoga al tiu de Germana Esperanto-Junularo, tiel ke la paĝoj de ambaŭ asocioj formas nun videblan kompletan. GEA-jen kore dankas al Dirk Bindmann por tiu valora helpo.

2010: GEK en Kaiserslautern

Jam ekviglas la unuaj preparoj por la Germana Esperanto-Kongreso (GEK) post du jaroj en Kaiserslautern. La ĉefa loka motoro, Dirk-Werner Hartmann, jam sukcese kontaktis la urban administojn kaj krome eklezian klerigejon, kiu disponigas tre taŭgajn salonojn en la urbokerno. Estas ankaŭ plano, demandi la Unuiĝon por Esperanto en Francujo (UFE), ĉu ili ne ŝatus kun kongresi tie.

DVD kun varbaj filmetoj pri Esperanto

GEA aĉetis certan stokon de nova DVD kun varbaj filmetoj pri Esperanto. En viglaj scenoj oni ricevas informojn en Esperanto, klarigataj per Germanlingvaj subtitoloj. Tiu DVD taŭgas por inform-vesperoj, por enkonduko de prelego pri Esperanto, ktp. La fina vendoprezo supozeble estos nur 5 EUR. Aktivuloj ricevos rabaton. Turnu vin al la GEA-prezidanto. *Rudolf Fischer*